

NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)

Redaktas:

Jesús Miguel García Iturrioz



Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>


En Fejsbuko, serĉu “esperanto grupo bilbao”

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Junaĝis 30 jaroj): 20 €.

KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550

JANUARO/MARTO 2021

Nro. 126 (1/21)



En la retejo de nia E-Grupo (<https://sites.google.com/site/esperantobi/home>) kaj, danke al Ana Manero, en Bitoteko (<https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/6175>) troviĝas la libro skribita de nia samideano Jesús Miguel García Iturrioz, kies titolo, “Historia de la lengua internacional Esperanto en Bizkaia”, klare montras ĝian enhavon. La libro, 113-paĝa, en la hispana lingvo, estas senpage elŝutebla. La titolpaĝo, kiun vi povas spekti supre, estis dezajnita de Iñaki Vélez.

Ekde la komenco de la 20a jarcento, floris E-asocioj en nia provinco, Bizkajo. La internacia lingvo travivis, kaj suferis, la hispanan internan militon kaj la sekvan 36-jaran diktaturon, la du mondmilitojn, la malfacilaĵojn politikajn kaj ekonomiajn ... sed nia E-Grupo sukcesis survivi ĉion-ĉi ekde ĝia fondiĝo en la jaro 1906.

LOKE ...

Ni ne sukcesis en la kristnaska loterio.



Unu fojon plian, la E-Grupo de Bilbao sekvis tiun hispanan kutimon partopreni la nacian lotadon de la 22-a de decembro, kiu iamaniere signalas la komencon de la jarfinaj festotagoj.

Ĉi-jare ni ne sukcesis atingi premion sed, kiel okazas tra la tuta lando, ni ĝuis la disdividon de nia sorto inter diversaj geamikoj tra la tuta Hispanio.

Dankon al ĉiuj, kiuj aĉetis niajn biletojn, skribitaj tute en Esperanto. Koran dankon!

Nia E-Grupo en Fejsbuko.



Ne forgesu ke danke al senlaca laboro de nia prezidanto, Pako López, nia Grupo troviĝas en Fejsbuko kaj ke en ties paĝaro estas multe da novaĵoj pri nia asocio kaj pri la urbo Bilbao. Vizitu ĝin.

Nia sociaro.

Je la 31-a de decembro 2020-a, nia E-Grupo havis **54 membrojn**. Laŭlonge de la jaro, pro la specialaj cirkonstancoj okaze de pandemio, aliĝis neniu nova, dum ni kondolencis la forpason de du ege gravaj homoj de nia rondo: José Luis Bringas kaj Eduardo Larrouy.

Monhelpo de Fondaĵo Esperanto al nia E-Grupo.

Unu fojon plian, Fondaĵo Esperanto (“Fundación Esperanto”) monhelpis nian E-Grupon pro ĝiaj agadoj dum la jaro 2020. Pli konkrete, pro organizado de E-kursoj. Ĉi-foje la subvencio sumis 300,00 eur., kio estas grava se oni konsideras ke la rimedoj de la Fondaĵo ne estas grandaj.

Koran dankon, tre speciale al nia kara amiko Lorenzo Noguero, Prezidanto de “Fundación Esperanto”.

Nova kurso.

Antaŭ la demandoj de kelkaj homoj pri organizo de E-kurso ni nur povis respondi ke eble en oktobro, se la pandemiasituacio tion permesas, ni klopodos ekigi novan elementan kurson. Dume, la interesitoj povas eklerni la lingvon pere de la diversaj kursoj, kiuj troviĝas en la reto: duolingo, lernu, ...

Nia Grupejo ne fermiĝis.




Dum la lastaj semajnoj, pro koronavirusa pandemio, en Vaskujo, ne eblis libere veturi for de la loĝmunicipo. Do, multaj homoj devis rezigni sin pri vizito al nia Grup-ejo. Tamen, kelkaj el ili, kiuj loĝas en Bilbao, kuraĝis rendevui kaj plu malfermi nian sidejon dum la kutima horaro: la vendredojn inter la 19:30 kaj 21:00 h.

Sur la apuda foto, eblas spekti niajn maskitajn amikojn Paco, Iñigo, Carlos kaj David. Mankas la fotistino.

<https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

Tabuoj: dio, seksumado kaj ... Esperanto.



Mi legis simpatian (kaj pripensigan) leteron en la revuo *Monato* (dec.2020). Anekse estas foto de la leter(et)o. En ĝi aperis kurioza informado:

Oni parolis pri "tri tabuaj temoj: dio, seksumado kaj...**Esperanto**. La homoj, kiuj praktikas ĝin, nur laŭdas ĝin; tiuj, kiuj nenion scias pri ĝi, misfamigas".

(Lorenzo N. 29/01/2021)

Informo rilate la Hispanan Kongreson en Comillas.



La estraro de Hispana Esperanto-Federacio kaj la Loka Kongresa Komitato de la 79a Hispana Kongreso de Esperanto, post interkonsento kun la loka urbestro de Comillas, decidis la okazigon de la hispana kongreso en tiu ĉi vilaĝo en la jaro 2022.

Tial do la Kongreso okazonta en Comillas (Kantabrio) estos la 80a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO. Tiu ĉi ŝanĝo signifas

unue, ke en 2021, HEF okazigos virtulan kongreson, kiu estos la 79a Hispana Kongreso.

Due, ke la LKK provos konservi la tutan kongresan kaj postkongresan strukturon preparitan por la 79a kongreso.

Trie, ke la LKK konsideras validajn ĉiujn aliĝojn ĝis

nun faritajn.

Se iu aliĝinto antaŭvidas jam nun sian neebulon partopreni la kongreson en 2020, bonvolu informi nin. Oni konsciu ke la LKK decidis tiun prokraston, por havi la plenan certecon ke tiam ĉiuj cirkonstancoj estos favoraj por multthomaj aranĝoj.

La LKK redonos sian aliĝkotizon al ĉiu, kiu ĝin petos. Same ni redonos la pagojn faritajn por la rezervo de ekskursoj.

Bedaŭrinde, la LKK ne povos redoni aliajn kostojn (pri vojaĝoj, loĝigo, k.s.) kiujn la partoprenontoj jam elspezis.

HEF kaj la LKK daŭre informos pri la evoluo de la du kongresoj, la 79a kaj la 80a, per siaj retejoj, sociaj retoj kaj aliaj komunikoj. Ĉiun demandon oni plu povas sendi al la adreso de la LKK kongreso@esperanto.es.

HEF kaj la LKK de la 80a HEK, bedaŭras la ĝenojn okazigitajn pro la decido kaj esperas vian komprenemon. Ni deziras sanon al esperantistoj en la tuta mondo, kaj esperas renkonti vin unue virtuale en 2021, kaj fine, kun gajaj realaj brakumoj, la 30an de aprilo de 2022 en Comillas.

Pedro Ullate López,
Sekretario de la LKK de la 80a Hispana E-Kongreso

Esploro pri Esperanto el la socia kaj kultura antropologio.

Hispana Esperanto-Federacio subskribis oficialan interkonsenton pri eduka kunlaboro kun la Aŭtonoma Universitato de Madrido, por la organizado de ĉeestaj studoj kun ties studentoj.

Kiel komenco, la interkonsento kovros la realigadon de esploro (kiel finkariera laboraĵo) en la fako Socia kaj Kultura Antropologio, kiu havos kiel celon la lingvon Esperanton kaj la esperantistan movadon. Tiu esploro havos parton teoriantan, sed ĝi baziĝos ankaŭ en aro da enketoj kaj intervjuoj kun parolantoj de Esperanto en Hispanio, kun la celo analizi la ecojn de la kolektivo el la vidpunkto de tiu disciplino.

(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 72. Feb. 2021)

Grava renovigo de Bitoteko.

La bita arkivo de Hispana Esperanto-Federacio, Bitoteko, ricevis dum pasintaj monatoj gravan renovigon, teknikan kaj forman.



Bitoteko apartenas al Europeana, la bita arkivo de la Eŭropa Unio, ekde 2013. Por tion atingi, Hispana Esperanto-Federacio subskribis siatempe kontrakton kun la tiama Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sportoj, per kiu HEF cedis la utiligon de siaj metadatenoj kaj devigis sin adaptiĝi al la teknikaj postuloj de Europeana.

Komence, la afero estis relative simpla, sed la informadika medio evoluas rapide kaj baldaŭ Europeana decidis ankaŭ evoluigi la manieron mastumi la metadatenojn ricevitajn el la diversaj kulturaj institucioj tra Eŭropo, kun la celo unuecigi la malsamajn modelojn de metadatenoj uzitajn de ili. Tio devigis nin je granda teknika penado, kaj HEF devis dungi specialigitan entreprenon. La laboroj komenciĝis fine de marto kaj, parte pro la pandemio, ili daŭris ĝis septembro.

Ni profitis la okazon por fari aliajn plibonigojn kaj por ŝanĝi la fasonon kaj aspekton de la Bitoteko. Kvankam mankas kelkaj detaloj, la rezulton vi povas jam ĝui. Pri la renovigo de la fasado, vi mem, enirinte, povos konstati la pli koheran ordigon de la informo, la aldonon de la angla kiel plia uzebla lingvo kaj la pli belan aspekton ĝenerale de la retejo.

Aliflanke, se vi iras al Europeana, kaj serĉas informojn rilatajn al Esperanto, vi trovos (proksimume) 5093 rezultojn el kiuj 4288 devenas el Bitoteko. La klopodoj pervaloris.

Jen do Bitoteko denove preta kaj je via dispono. Aliru la kutiman adreson <https://bitoteko.esperanto.es/> kaj profitu ĝin!

(El la retejo de HEF)

Kreskas la informadika skipo de HEF.

Kiel treeble vi scias, HEF, iom post iome, proponas novajn servojn en la Reto. Ĝi tenas ne nur sian paĝaron, sed ankaŭ Bitotekon, la bibliotekajn katalogojn, datenbankojn, kiel Tradukoteko, kaj eĉ la tre uzatan vortaron de De Diego.

Aperis multaj novaj taskoj kaj ili fariĝis pli malsimplaj kaj fakaj, kaj sekve de tio ŝprucis, do, la maltrankvilo, ĉu ĉio ĝis nun konstruita daŭros, se la tuto plu dependas nur de unu sola homo, kiu povas trapasi personan problemon, kiu malebligus lian laboron.

Kadre de tio, ni lanĉis kampanjon en la retejoj por allogi novajn kunlaborantojn. Jam aperis novaj volontuloj, eĉ dise en la tuta lando, el Granado, Kanario, Kastilio-Leono aŭ Madrido, kio pravas ke ĉiu ajn intereso povos partopreni, sendepende de la loko kie li aŭ ŝi troviĝas.

La grupo jam komencis krei dokumentaron kun ĉiuj teknikaj datenoj necesaj por teni nian agadon en la Reto. Ni esperas, ke per tiu nova forto, ĉio atingita ĝis nun daŭros estontece, kaj eĉ ni kredas, ke ni povos baldaŭ entrepreni novajn projektojn. Dank'al niaj novaj kunlaborantoj ni jam povis plibonigi Tradukotekon, kaj celas renovigi la vortaron kaj la paĝaron. Kompreneble, ni estus eĉ pli entuziasmaj se pliaj teknikuloj dezirus partopreni, por kio, se vi interesiĝas, ne hezitu peti informojn pri tio je esperanto@esperanto.es.

(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 72. Feb. 2021)

Estas granda diferenco inter lerni la ciferecon kaj lerni ciferece.

En belga ĵurnalo estis interesa artikolo pri la ĝeneraligo de cifereca instruado en la lernejoj, i.a. pro la koronaviruso (*) laŭ D-ro Benoit Galand, profesoro pri edukaj sciencoj en la Universitato de Louvain (Lovenjo, Belgio).

Laŭ li estas granda diferenco inter **lerni la ciferecon** kaj **lerni ciferece**. Fakte, la interagado ebligita de ĉi-tiu ilo rapide troŝarĝas la atenton kaj labormemoron. Studoj montras, ke studentoj ĝenerale lernas malpli bone ol per papera komunikilo. Krome, kaŝitaj kostoj estas ligitaj al la vasta uzo de cifereca teknologio en la lernejo. Nepras aĉeti la aparataron estas nur parto de la ciferecaj kostoj. Oni ankaŭ devas pensi pri regulaj ĝisdatigoj kaj la rapida malnoviĝo de komputila aparataro. Sen menci, ke por produkti komputilojn kaj tablojdojn oni devas ĉerpi maloftajn minaĵojn, malgraŭ mediaj reguloj. Krome malnovaj komputiloj kutime alvenas en rubodeponejojn en sudaj landoj.

Sed, kian lokon oni devas doni al cifereca en edukado? Estas vigla debato inter tiuj, kiuj diras, ke estas ĉefprioritato renkonti hodiaŭajn edukajn defiojn kaj la bezonojn de nia ekonomio, kaj tiuj, kiuj kredas, ke ĝi estas minaco por la intelekta disvolviĝo kaj sano de niaj infanoj. Laŭ prof. Galand, la celo de tiu teksto estas resumi studojn pri la efikoj de cifereca teknologio ĉe studentoj. Pli specife, sep aktualaj ideoj ĉirkaŭ cifereca en edukado estas diskutitaj: 1) la interagado kaj plumedio naturo de cifereca akcelado; 2) cifereca teknologio antaŭenigas aŭtonomion de lernantoj; 3) cifereca pli instigas; 4) videoludoj kaj programado permesas disvolvi transversajn kapablojn; 5) scioj haveblas interrete, do ne necesas instrui kaj lerni ĝin; 6) la hodiaŭaj lernantoj esence diferencas de tiuj, kiuj venis antaŭ ili; 7) cifereca teknologio ebligas malaltigi la kostojn de edukado. La rezultoj indikas, ke ĉi-tiuj ideoj plejparte eraras. Koncerne la lernadon, cifereca ŝajnas nek pli bona nek pli malbona ol alia ilo aŭ rimedo, sed havas kaŝitajn kostojn, kiuj ofte estas malmulte menciitaj.

(<https://ojs.uclouvain.be/index.php/cahiersgirsef/article/view/54253>).

(*) La Dernière Heure, Maïli Bernaerts, “*La généralisation du numérique a un coût politique*”, 23 nov., p. 11)

(*Germain Pirlot. 20/11/2020*)

Esperanto kaj universitatoj.

La laborgrupo pri Esperanto en universitatoj okazigas Kunpensadon: Esperanto kaj Universitatoj (La 12-a sesio). De Internaciaj Korespondaj Esperanto-Universitatoj ĝis Internaciaj Virtualaj Esperanto-Universitatoj - Ĉu Ĉio nur Fantazio? Kial ne Okazas Io?

La registritajn filmojn de la 11 antaŭaj sesioj - kun partopreno de ĉ. 40 samideanoj, kaj kontribuoj de i.a. geprofesoroj Ilona Koutny, Nina Daniljuk, Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Orlando Raola, Dennis Keefe, Vincente Manzano-Arrondo kaj Amri Wandel - vi povas spekti en:

<https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>

(*Radojica Petrović. Jan. 2021*)

Mineraloj el rubo.

Kiel jam kalkulis la raporto „Global 2000“ de 1977, nia tutmonda ekspluadado de mineraloj kaj fosiliaj energio-fontoj (karbo, nafto, uranio) havas limojn. Krome la ekspluatado ofte kaŭzas poluadojn - ekzemple la prilaboro de Bauksito al aluminio. Tial indas uzi ilin ŝpareme, kaj recikli laŭeble. Kion oni jam kutime faras ĉe metaloj kiel fero kaj kupro, nun pli kaj pli necesas ankaŭ ĉe aliaj mineraloj - ekzemploj:

Zinko - ankoraŭ ne tre multekosta, tamen en Svedio oni uzas metodon de KTI kaj eltiras zinkon el la flug-cindro de rubo-bruligfornoj;

Fosforo - tre grava por la agrikulturo - je kelkaj deponoj (ekzemple sur la insulo Nauru) oni jam vidas la limon; kaj landoj kiu ne havas propran fosforo-deponejojn serĉas alternativojn; t.s. uzi la feĉon el la klarig-instalaĵoj kiu kutime enhavas fosforon; teorie eblus rekte redoni tiun feĉon al la kampoj, sed ili ofte ankaŭ enhavas toksajn metalojn. Post la bruligo de tiu feĉo oni povas ekspluati la fosforon.

(pri zinko) <https://www.sonnenseite.com/de/wissenschaft/zink-aus-muellverbrennungsanlage-gewinnbar/>

(ĝenerale) https://de.wikipedia.org/wiki/Urban_Mining

(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 19/12/2020)

Mencio de Woody Allen.

Kuriozaĵo sendita de amiko: en la lasta membiografio de Woody Allen "A Propósito de Nada", estas iu mencio de Esperanto.

"También era mujeriego (se refiere al actor Tony Roberts), y más tarde actuamos juntos en Play It Again, Sam, durante una de las funciones no apareció en escena en el momento que le correspondía y me dejó balbuceando solo en el escenario porque estaba tratando de ligarse a una de las actrices en su camerino. Yo (se refiere al propio W.Allen), que soy todo un soldado que no se arredra ante nada, me quedé paralizado y me puse a hablar en **esperanto**".

Mi trovis la citaĵon en la angla originalo kaj ne temas pri inventaĵo nek adapto de la tradukisto. Tamen, mi ial suspektas ke temas pri ŝercaĵo, kaj ke li ne vere parolas nian lingvon, ĉu? :)

(José Antonio del Barrio. 28/01/2021)

Nesolidara Luksemburgio.

Bedaŭrinde Luksemburgio apartenas al la oazoj por imposto-ŝparado ene de EU. Aparte dum tempo kiam ĉiu lando bezonas multe da mono por stabiligi kaj subteni tiujn ekonomiojn kiuj estas trafitaj de la kronviroza pandemio gravas ke almenaŭ enlande la ŝtatoj ricevas impostojn. Bedaŭrinde ankaŭ germanaj firmaoj uzas tiun oazon por ŝpari impostojn. Kompreneble alia afero estas ke Amazon k.s. fraŭdas impostojn pere de ŝovado de profitoj en aliajn landojn. Ambaŭ estas ne-solidaraj agadoj. Sven Giegold, MP de la EU Parlamento citis esploron de ĵurnalistoj: [openlux.lu Jen lia komento \(en la germana, sed ankaŭ angle\): https://sven-giegold.de/openlux-luxemburges-reaktion/](https://sven-giegold.de/openlux-luxemburges-reaktion/)

(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 15/02/2021)

Reta ŝerco iĝis delikto kontraŭ la Civito.

La Esperanta flago jure apartenas al la Esperanta Civito, kaj tiu kiu metas ĝin sur seĝo en sia dormoĉambro kulpas pri insulta delikto kontraŭ la Civito. Tion rezoluciiis la Kapitulo de la Civito post kiam ŝerca redakto en Vikipedio estis denunciata al ĝi.

La indignon de la Civito vekis unu frazo en la Vikipedia paĝo pri la IJK-flago. La 20-an de oktobro 2020 la TEJO-oficisto Mia Nordentoft post diskuto kun Robin van der Vliet ŝerce enskribis la jenan kompletigon:

“Ĉar la 77-a IJK en Someren, Nederlando ne okazis fizike pro la COVID-19-pandemio, la flago neniam estis transdonita. La flago nun kuŝas en la dormoĉambro de Robin van der Vliet, kie ri uzas ĝin kiel subtenilon por siaj malpuraj vestaĵoj”.

Leginte tiun frazon, la civita senatano Anna Bartek (Anjo Amika) en decembro 2020, laŭ tiama komuniko, “interpelaciis la Konsulon konforme al la art. 27 par. 1 de la senata reglamento”. La komuniko konkludis:

“La uzon de nia flago efektive normigas Lex signorum, sed ĝi ne donas precizan regulon okaze de malrespekto; tial validus la Svisa Kodo, kiu estas aparte severa: se sviso kondutus kiel tiu nederlandano, li riskus eĉ enprizonigon”.

Tuj post la apero de la Civita komuniko la vortoj pri malpuraj vestaĵoj malaperis al Vikipedio. Anstataŭe estas nun skribite, ke la flago kuŝis sur seĝo en la dormoĉambro de Robin van der Vliet. La redakto tamen evidente ne konvinkis la Civiton pri tio, ke TEJO montras sufiĉan respekton al sia propra flago, kaj la primara instanco daŭrigis la plenumon de siaj konstituciaj povoj.

Eblus demandi, kian rilaton la Civito entute havas al la flago de TEJO, kiu almenaŭ ĝis nun ne subskribis la Civitan Pakton. Tamen, laŭ la Civito mem la respondo estas simpla: la Esperanta flago jure apartenas al la Civito, ĉar la Civito registris ĝin en 2001, okaze de la promulgado de sia Konstitucia Ĉarto, kion ajn tio signifas.

“Do jure la tradicia esperanta flago (en eŭropa, do nek en svisa nek en usona formato) apartenas al la Esperanta Civito: konsekvence, kiu insultas la esperantan flagon, tiu insultas precipe la Esperantan Civiton”, la komuniko asertas.

Ĉar ial ĝis nun mankas en la civita “Lex Signorum” paragrafo pri malrespekto al la flago, la Kapitulo rekomendas aldonon de tia reguligo:

“Konsekvence estus oportune enkonduki komplementan modifon en la leĝon pri la simboloj (“Lex signorum”), kiu specifigu la signifon de malrespekto al la flago(j). Tion faru tamen ne la ekzekutiva, sed la leĝodona povo, do ĝi rezultu el iniciato en la Senato, ne en la Kapitulo: simpla (vic)konsula dekreto ne sufiĉus. Des pli oportune, se estus komuna iniciato de la majoritato (Verda, laika) kaj de la opozicio (Blanka, konfesiema).

Ne vere klaras, kian signifon en la praktiko havus la aldono de tia “komplementa modifo” en la civita leĝaro, kaj ĉu ĝi estonte ebligos al Civitaj policianoj regule inspekti la dormoĉambrojn de TEJO-anoj por kontroli, ĉu TEJO-flagoj tie tro proksimas al malpuraj ŝtrumpetoj.

(El “Libera Folio”. 02/03/2021. Prenita el diskutejo “Iberia Esperantistaro”)